

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista. 3 FF.  
N° 36 (54) - Julio/Aŭgusto 1981

ISSN 0150-5823



Eldonas : Cercle espérantiste de \* Abono por unu jaro : 18 FF  
1'Agenais, F 47340 LAROQUE \* (14 FF en Francio)  
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux \* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## ENHAVO

2. Esperanto-gramoj (A.Madej)
  3. Nia debato :  
La Virina Problemo (J.G.,  
R.Pontnau, Nicole Déjean,  
L.Tomesoli, Denise, Julieta,  
Jacqueline, B.G.D.)
  13. En Francio, nun... (Kribo)
  14. Ĉies tribuno :  
Pri racio/raciismo (Valo,  
B.G.D., Lorenzo)  
Uzita papero, supersignoj,  
pronomoj (Vito)
  21. Nia pasintjara felietono :  
Tra Eŭropo per fervojo kaj  
esperanto (Jakelino)
  26. Maljunulo rakontas (-nn-)
  27. Aleksandro Ogorodnikov  
(Amnestio Internacia)
  28. Vivo de "Laŭte!" (Kribo)
  29. Recenzo (Valo)
  30. Nia felietono :  
Tra la mondo per biciklo  
kaj esperanto (Alfa-Beta)
  33. Nun Larzako komenciĝas!  
(N.Déjean)
  34. SAT-Broŝurservo (Kribo)
- I/IV. Esperanto-Vivo :  
\* Margene de la 36a (LUPO)  
\* "La Grande Relève..."  
\* "Lot-Garonio"  
\* "Ĝirondio"  
\* "La Krizalido"  
\* Pri energio dum E-kongreso
- Aldone al abonantoj :  
Adresaro de Laŭte - 1981 -

# ESPERANTO - GRAMOJ

## Nekonata fragmento de "Sinjoro Tadeo"

Ĉu mi ĝisvivos tiun ĉi konsolmomenton,  
Ke, Esperanto migros al mondparlamento ?

### Denunco

Jen ege grava sciigo, karaj samideanoj :  
En Tomašov Mazovjecki estas la mondlingvanoj!

### Por nia reproduktiĝo

Min ĝojigas Zamenhofa l'ideo nobla,  
Sed pli mi estus ĝoja pro anar' duobla !

### Kial vivi ?

De la vivo pasis jam multaj jarcentoj  
Kaj ni plu ne havas por viv' argumentojn.

### Pri junaj amikoj

Jen mia konstato ne sen amaro,  
ke tre oldiĝas nia junularo.

### El propraj spertoj

En la mondo vere estas krizo !  
Mi mem, ankaŭ ne havas devizojn!

### Por pli da persisto

Multaj samideanoj  
ĉesas jam ĉe l'kalkano.

### Pagita amo

La kontakto  
de kont-aktoj.

### Virina konkurso

La vetkuro  
de belkuroj.

### Interhoma kompreniĝo

Ĉio glatas,  
Se ni flatas.

### La poŝo de civitano

Nur la malplenan poŝon  
beligas sola groŝo.

### Homa paro

Jen estas paro ideala  
Li Amoro, ŝi amoral\*.

### Ĉu ?...

Ĉu la krokodiloj  
havas belajn stilojn.


### Pri unu politikisto

Por flugigi la blankan kolombon  
Li timigas ĝin per N-bombo !

A. Madej

\*senmorala.

# LA VIRINA PROBLEMO



Krom en kelkaj "primitivaj" socioj, la virinoj estis konsiderataj kiel malsuperaj estuloj, ne nur fizike sed ankaŭ mense.

Jen tri karakterizaj opinioj de famaj viroj :

De la "humanisto" Alain : "Mi ofte ekdeziras peti de la virinoj, per kio ili anstataŭigas la inteligenton".

De la katolika filozofo Lamennais : "La virino estas viva statuo pri la stulteco. Farante ŝin el huma restaĵo, la kreinto forĝis la intelekton."

De la "Patro de la Anarkismo" Proudhon : "Virino, kiu uzas sian intelektan kapablon, fariĝas malbela, freneza kaj simiino."

Kaj oni povus daŭrigi la liston da laŭreatoj !

\*\*\*

Sub la influo de la religioj, de la moralo, de la edukado (vidu la lernolibrojn por infanoj pri la seksistaj kriterioj!), la plimulto el la virinoj rezignaciis je sia sorto : submetiĝo al la edzo kaj ankaŭ al la mastro, kiam ŝi laboras ekstere. Nur kelkaj intelektulinoj ribelis : Flora Tristan, Louise Michel, A. Kollontaj (komence de la soveta revolucio), Roza Luksemburg, Simone de Beauvoir k.a. La duobla ekspluatado de la virinoj krom ĉe kelkaj evoluantaj paroj aŭ komunumoj, ekzistas ankoraŭ hodiaŭ, eĉ ĉe la progresemaj aktivuloj. (Vidu la franclingvan broŝuron : "LIP au Féminin" pri la sinteno de la viroj dum la fama striko).

La revoluciaj teoriuloj klarigis, ke la forpelo de la

\* La unua parto aperis en "Laŭte!" n-ro 35.

kapitalismo solvos la virinajn problemojn. Tio tute ne pravas. Dum la hispana milito, en la revolucia sindikato C.N.T. la virinoj estis devigataj krei sian propran organizon "Liberaj Virinoj" por defendi siajn interesojn.

Pri la ekonomia vidpunkto: ankaŭ multnombraj estas la profesioj, kie la virinoj ankoraŭ gajnas malpli ol la viroj por sama laboro.

La lukto de virinoj por propraj celoj kaj en propraj movadoj aperis sur la publika scenejo precipe en la jaroj '60. Unue en Usono, ofte per provoka sinteno kontraŭ la virseksulo : libro de Kate Millet "La Virseksa Politiko" kaj precipe la S.C.U.M-Manifesto de Valerie Solanas, kiu proklamis : "Ni volas tranĉi la virojn!" Certe oni povas krei je troigo, je eraro pri la vera malamiko : ĉu la viro, ĉu la kapitalisma sistemo ?

En Francio kaj aliaj latinaj landoj (sub la influo de katolika moralo) la luktoj okazis precipe por postuli naskpreventon kaj liberan kaj senpagan aborton, ankaŭ por eksedziĝo en Hispanio.

Estas vere ke, kiel diris Kdo Panerai, foje la virinoj simias la virojn fumante, drinkante ktp, sed kiel la adoleskanto simias la plenkreskulojn por aserti sian personecon, ofte oni strebas simii la "valorojn" de la aliaj antaŭ ol trovi la proprajn !

Mi kredas, ke la virina emancipiĝo devas esti faro de la virinoj mem kontraŭ ĉiuj "falokratismoj" (Por mi ankaŭ Thatcher kaj aliaj potenculinoj estas "falokratoj"), ne celante esti similaj al la viroj, sed egalrajtaj en siaj diferencoj, sed por tio la virino devos disrompi multajn antaŭjuĝojn ankaŭ en propraj movadoj, kie la pov-avido de kelkaj rolulinoj ekzistas.

J.G.

\* \*

Pri virina problemo preferinde sin esprimu virinoj mem. Tamen mi klopodu difini kaj limigi tiun problemon.

Unue mi supozas, ke temas pri virinaj problemoj, ne pri virino kiel problemo, kiel supozigas la titolo de la enkonduko. Mi supozas plie, ke temas pri la virinoj en niaj landoj, ne en la tria mondo (aŭ evolulandoj, ĉiu

elektu mem sian preferatan dirmanieron). Tamen mi mallonge rememorigu, ke virinoj en industriaj landoj ne estas la plej malfeliĉaj, al neniu knabino oni fortranĉas klitoron (kiel en sufiĉe multaj islamaj landoj), ne videblas vualitaj virinoj, ne estas malpermeso stiri aŭton (kiel en Saŭd-Arabio). Tamen virinoj ne ĝuas similan kondiĉon al tiu de viroj. Por sama laboro ili ofte ricevas malpli ol viroj, estas konsiderinde pli da senlaboraj virinoj ol da viroj. Ankaŭ hejme, virinoj estas tradicie ŝarĝitaj per laboroj, kiujn viroj kutime ne faras. Tamen virinoj ĝuas almenaŭ unu gravan avantaĝon, ili ne devas militservi. Ankaŭ nelaboremaj virinoj havas multe pli da ŝancoj sin vivtenigi ol la malo...

Por mi la emancipiĝo de la virinoj estas ĉefe ekonomia fakto, oni sendependiĝas, kiam oni povas sin vivteni mem. La ĉefa celo de la virinaj movadoj devus esti atingo de la samaj laborŝancoj kaj kvalifiko por ambaŭ seksoj, kvankam perfekta egaleco estas nebla, ĉar gravedeco estas grava malhelpo por laboranta virino (kiun neniu alia povas transpreni). Krome evidentiĝas, ke virinoj ne agas alie ol viroj en sia aktiva vivo. Estas virinaj pacistoj, kaj konservativaj virinoj (vidu s-inon Thatcher), feliĉe (aŭ ne) regas tie perfekta egaleco.

Al mi ŝajnas, ke neegaleco de la virino estas ekonomie kreita situacio, ke perfekta egaleco inter ambaŭ seksoj tamen ne eblas pro natura kialo (gravedeco) kaj ke la nuna ekonomia krizo malhelpas la virinojn atingi pli da egaleco (aŭ malpli da diskriminacio ; ĉiu elektu mem sian preferatan dirmanieron) almenaŭ tiel multe kiel la pezo de la historia tradicio.

Robert Pontnau.

\* \*

Estas tre malbonvenaj vortoj en la tekstoj de Robert Pontnau kaj de Alessandro Panerai... Kiam oni ne volas pri-trakti problemon, aŭ ĝenantan temon, oni insultmokus ĝin, oni limigas ĝin je simplaj anekdotoj, substrekante nur la faritajn erarojn... Estas fuĝo!

Se ne estus problemo pri virina kondiĉo, pri virina emancipado, kial aperus tiujagresemo, moko, duboj, suferoj,



koleroj pri tiu temo ? Vidu ĉirkaŭ vi, en via familio, medio, legu gazetojn, atestojn... Ĉu ne estas tempo por ĉiu homo, vira kaj virina, rekoni farendan revolucion en la mensoj kaj samtempe en la socia organizado, pri la statuso de la virino kaj konsekvence pri tiu de la viro ?

La feminisma revolucio estas universala, monda, nepre necesa en la plej riĉa same kiel en la plej mizera medio, por ke homaro progresu. Ĝi estas parto de homara emancipado el ĉiu ajn submetiĝo, ĉar temas pri strebado al pli bona kompreno, konscio, respekto de la vivo, de la estuloj, estaĵoj...

Por tiujn skemojn, kiuj enkatenigas nin same kiel normigoj, vira kaj virina naturo (aŭ speco por kelkaj), kiuj pluigas ĉiajn rasismojn!

Aktivaj virinoj (kaj viroj) pere de feminismaj asocioj, movadoj, luktis kaj ankoraŭ luktas por leĝe havi la samajn rajtojn kiel la viroj por vivteni sin sendependaj, por vivi memstare siajn diferencojn sen pliaj malfacilaĵoj, ekzemple, por ke gravedeco ne estu konsiderata kiel handikapo. Por la plimulto estas ĉiutaga kuraĝplena provo, ĉar estas tenemaj la tradiciaj imagbildoj de la "Virino" en la mensoj. Estas necese, ke virinoj ne plu sentu sin kulpaj eskapi al la tiel nomataj inseksaj taskoj, sentoj, submetiĝoj, se tiuj ĉi ne taŭgas al ili, ke viroj ne plu sentu sin defalintaj kiel privilegiuloj forpelitaj.

Ŝajnas, ke, de longa tempo, en ĉiuj ajn socioj, tribo, monarkia, respublika, la valorokriterio estis vira. Ĉiam referencoj al la viraj kvalitoj, sintenoj je ĉiuj niveloj, de la plej materia ĝis la plej filozofia. Tio aperas en la strukturo de lingvo. Eĉ en la tiel nomataj evoluintaj landoj, virino sukcesas laŭ socia vidpunkto, se ŝi montras la samajn kompetentecojn en sia profesio, aktiveco, kiel la viroj.

Laŭ sia socia klaso virino estas forapartigita al taskoj taksataj subalternaj aŭ malseriozaj : servistino, ne fake kompetenta laboro kiel subproletino, aŭ luksa objekto, proprietaĵo, distingilo de viro (kiel aŭtomobilo). Vidu la rolon de la tiel nomataj altrangaj sinjorinoj, edzinoj de ŝtatestroj, ekzemple.

Por viro, ofte estas tutnature vivteni virinon tre bonŝancan nenion fari, ne laboreman laŭ lia opinio, ĉar evidente mastrumado kaj eventuale vartado de infanoj ne estas laboro, nur plezurigaj taskoj...

Plej ofte nekonscie virino iĝas proprietaĵo de viro, li donas al si rajtojn rilate al ŝi, pli-malpli tiranajn laŭ sia persona mensa evoluo. Ke virino sin adaptis al la vira sinteno sciante aŭ ne sciante utligi ĝin, ke ŝi ne konscie asimilis viran ideologion, neniel pravas superecon aŭ malsuperecon de unu aŭ de la alia. Estas ĉefe elemento de koloniado. La plej malica estas ja la kultura, ideologia koloniado. (Ĉu ne tial ni aprobas esperanton ?). Kiam iu posedas potencon ekonomian, moralan, estas tre malfacile al li rezigni pri ĝi kaj la regato aspiras al potenco aŭ almenaŭ provas kiel eble plej bone profiti la situacion. Malkontesti, konscii pri la vira koloniado (eĉ se oni eskapis mem al tiu "fatalo") ne estas fornei la aliajn prematecojn multnombrajn, multaspektajn de ambaŭ, viro kaj virino, el malbenplenaj sociaj klasoj, el landoj nomataj "evoluantaj landoj"...

Jam de longe, en ĉiu epoko, pli-malpli malfacile, ankaŭ estis viroj kaj virinoj, kiuj konsciis pri siaj egalrajtoj, siaj egalvaloroj homaraj, solidare kunigante siajn kompetentecojn por provi solvi siajn problemojn ĉu personajn, ĉu sociajn, ĉu filozofiajn. Estis evoluintaj, liberigataj mensoj, ofte persekutitaj.

Nuntempe, la feminisma movado plivastiĝas, en diversaj medioj kaj landoj. Kvankam troigoj, revenĝoj ofte akompanas tiun liberigon, la mensoj pli-malpli profunde evoluas. Edukado, klerigado helpas al emancipado de la homoj. De la komenco gravas, ke la gejunuloj ricevu la saman edukadon (hejme kaj en lernejo), ke ili havu la samajn ŝancojn por studi, lerni profesion, ke ili kune partoprenu al diversaj aktivecoj sen iu ajn klivado. Tiamaniere malaperas mitoj pri virinoj kaj viroj.

Naski infanon, partopreni al militservo, al milito, varti, eduki infanon, labori en uzino aŭ en administracio ktp, koncernas virojn kaj virinojn. Same kiel virinoj ne devus fuĝi ekonomiajn, politikajn, filozofiajn temojn, viroj ne devus fuĝi tiujn pri mastrumado, familia ekonomio,



sano, seksaj problemoj... Ŝajnas, ke estus bone, ke, respektante unu la alian, ili kune serĉu kiel pli bone vivi, kiel trovi ekvilibron, kiel dispartigi la necesajn taskojn, kiel esti responsaj...

Estis "Jaro de la Virino" kaj en pluraj landoj estis ŝtate pri-traktitaj la virinaj vivkondiĉoj, kaj la feminisma movado iĝas politika temo en la politikaj partioj por varbi voĉojn dum voĉdonado. Ĉu estas provo de neŭtraligo de revolucia forto? Ĉu estas antaŭenpaŝo?

Multaj demandoj, multaj pripensoj, multaj precizigoj, klarigoj estus farendaj; la temo estas tiel ampleksa, grava... Mi lasas ĉiun al propra konsciigo!

Nicole Déjean.

\* \*  
\* \*

Ĉu virina problemo, aŭ homa problemo?

\*\*\*\*\*

Ĉiu estu egalrajta! Sed nek klopodoj de progresemluloj, nek ŝtataj leĝoj, nek batalo kontraŭ ĉiuspecaj diskriminacioj plibonigos la nunan staton de homaro, en kiu regas la perforto. Kial?

La mekanikan martelon de la perforto oni povas certe insulti, ankaŭ loki sian korpon inter ĝi kaj amboso. Kiom efikas tiuspecaj metodoj multe uzataj? Ĉu ne estus pli logike trovi la ŝaltilon kaj haltigi per ĝi la perforton?

Do, analizu ni la aferon unue, cele la trovon de la kaŭzo de tiu faktostato. Poste ni povos agi pli efike.

La analizo de la afero, jen:

Ineco diferencas nature de vireco, partoprenante pli aktive kaj pli korpe al donaco de la vivo pere de naskigo. Vireco estas instinkte pli agresema, ĉar unu el ĝiaj naturaj roloj estas defendo kontraŭ la agresontoj. Do vireco postulas esence la morton de malamikoj.

Ĉu pli valoras vivo aŭ morto?

Laŭ ekologia vidpunkto, la respondo dependas de la denseco de la loĝantaro. Ĉar la Naturo agas kiel regulilo

pere de la agresemo pli-malpli forta de homoj. Ankaŭ memmortigaj agoj estas unu el la rimedoj de Naturo. Tial la danĝera kondukado de veturiloj, perforto, maltoleremo, milito, memmortigo tradicia aŭ ne, epidemioj... ktp, estas la diversaj aspektoj de unu malbono: Loĝantaro tro multnombra. Tion mi diras fabele en mia kanzono "Hara-Kiri", en kiu mi neniam intencis kritiki la kulturon de niaj amikoj japanaj. Ĉu mi kulpas, se "Hara-kiro" estas pli spektakleca ol la pendumiĝo de francaj memmortigemuloj aŭ la dronado de senesperaj inoj?

Do, la konkludo: agi kontraŭ tronaskiĝo estas batali por la virina emancipiĝo.

Ĉar "malmulteco estas rareco", igante la densecon de la vivo al malmulto, oni valorigas ĝin. Kaj amo al la vivo estas ankaŭ amo al virineco en ĝiaj plej belaj kaj plej homaj esprimoj.

Lorenzo Tomesoli.

\* \*  
\* \*

Mi estas virino. Mi ne estas feministo. Laŭ mi, kion oni riproĉas al iuj viroj, oni povas same riproĉi al iuj virinoj.

Konsideris min kiel objekton nur patrino mia. Por ŝi mi estis posedaĵo ŝia. Iafaĵe mia patro devis defendi min kontraŭ ŝia aŭtoritatismo. Nur en sia lasta maljunaĝo, kiam venkita de la malsano, ŝi rigardis min memstara homo. Kaj mi asertas, ke mia patrino ne estis viro!! Tia koncepto ŝia okazigis multajn konfliktojn kaj malfeliĉon. Aliflanke mia patrino kaj ankaŭ mia patro instruis al mi defendi min en diversaj vivokazoj, kaj mi neniam timis la nokton, danĝerajn renkontojn, labordonanton kaj aliajn.

Neniam viro konsideris min objekto. Mi kredas, ke libereco estas ankaŭ io interna. Kiam oni sentas sin interne libera, oni eĉ nevole havas liberan sintenon, kiu inspiras ian respekton. Mi kredas, ke libero estas afero ne de viro aŭ de virino, sed de individuo.

Antaŭ kelkaj jaroj mi aŭdis pri manifestacio de virinoj, kiuj surstrate suprenlevis virinkalsonetojn kaj mamzonojn

por signi, ke ili ne plu seksrilatos kun la viroj, ĝis ili atingos kontentigon de siaj depostuloj ! Nu, ili per tiu ago sin agnoskis mem objekto, eĉ pli, seksobjekto. Kia stultaĵo ! Kia sendigna konduto ! Kvazaŭ la seksrilato estus mekaniko celanta nur kontentigon de fizika bezono vira...

Kompreneble mi ne kontestas, ke la virino estas en la socio ekspluatata, sed ankaŭ la viro. Mi revenu al mia familio, ĉar ĝi tute ne estis escepto. Mia patrino kiel 12-jara knabino ĉiusezone, ĉiuvetere ellitiĝis je la kvina matene por disdoni la ĉiutagan gazeton al la burĝaj hejmoj. Mia patro kiel 11-jara knabo laboris funde de la minejo 12 horojn tage. Mi en tio vidas nenian diferencan de traktado. Se hodiaŭ la ekspluatado estas malpli akra, ĝi estas same egala kontraŭ la viroj kaj la virinoj. Ni batalu ĉiufoje, kiam homa estaĵo - vira aŭ ina - estas subpremata, ekspluatata, enkarcerigita, iel torturata. Laŭ mi, ne temas pri batalo de virinoj kontraŭ viroj, sed de klaso kontraŭ klaso. Por atingi egalrajton, ni batalu kune - viroj kaj virinoj - kontraŭ la socisistemo. Kiel ekzistas virinoj, kiuj bone scias bone regi la edzon, same ekzistas virinoj, kiuj tre bone scias ekspluati aliajn virinojn.

Viro kaj virino devas laŭnature vivi kune. Ni strebu al reciproka komprenemo, al harmonio en la privata vivo, ni kune batalu por ŝanĝi la socisistemon, por forigi la militojn inkluzive de la intersekse milito.

Ĉio ĉi eble multe dependas de la unua edukado, kio ne estas konsolo, ĉar multaj tion komprenis kaj la socio pli kaj pli frue enkadrigas la infanon... Sed mi foriĝas de la virina vivkondiĉo...

Denise.

\* \*  
\*

Mi opinias, ke jam de jarmiloj la virino estis la sklavino de la viro, kaj pro tio ŝia emancipado venos nure de ŝi kaj pere de ŝi post konsciiĝo ŝia, sed ŝi devos sin gardi por ne fali en la samajn "difektojn" kiel la viro. Ŝi ne devos lin imiti, sed "krei" novan socion en kiu ĉiu partoprenos sen priseksa hierarkio en ĉies feliĉigo.

Julieta.

Politiko kaj telerlavado  
\*\*\*\*\*

Iam mi partoprenis dum semajnfino renkontiĝon pri neperforto. Dimanĉon post la tagmanĝo, mi subite konsciis, ke mi kaj 6 viroj diskutadas pri politiko, dum 6 virinoj estas lavantaj la telerojn.

Kial mi ne leviĝis kun la aliaj ? Ĉar mi estis edukita alie ol ili. Mia patro amis siajn infanojn, sed li kredis, ke zorgi pri infanoj estas tasko de virino. Tial mi estis edukata nur de mia patrino. Ŝi estis unu el tiuj sklavinoj, kiuj silente servas la virojn, sed ŝi malŝatis sian kondiĉon, kaj volis ion alian por sia ununura filino. Tial, dum miaj fratoj de temp' al tempo lavis telerojn aŭ trikis, mi ne havis la rajton ektuŝi viŝtukon : ĉiam mia patrino diris, ke mi devus zorgi unue pri lernejoj taskoj. Mi kreskis kun la ideo, ke, kiam mi estos granda, mi per intelekta laboro akiros salajron sufiĉan por dungi puristinon.

Mi kreskis, kaj hodiaŭ mi laboras oficeje, kaj la salajro ne sufiĉas por dungi puristinon. La malavantaĝon de mia edukado mi konstatas, kiam subite malkudriĝas iu vesto, aŭ kiam la stomako doloras nur, kiam ĉiuj vendejoj estas ferm-itaj. Pli facilas verki artikolon en Esperanto, ol rekudri butonon. Laŭdire tio estas la situacio de maljunaj fraŭloj ! Se mi estus viro, mi bezonus nur trovi bonan edzinon !!!

Ĉu akuzi la gepatrojn, ĉu akuzi la virojn pri egoismo ? Laŭ mi, tio ne utilas : oni ne povas diskuti kun iu pri temo, kiun li aŭ ŝi tute ne konas. Tiuj 6 viroj, kiel neperfortaj aktivantoj, estis kontraŭ virina diskriminacio, sed la malpurajn telerojn ili tutsimple ne vidis, ĉar la sklavinoj ilin forportis tuj komence de la politika diskuto. Do kion fari ? Laŭ mi, la nura racia konduto estas la striko. Tion mi iam diris al mia patrino, sed ŝi sentus sin kulpa, se mia patro ne ricevus sian manĝon ĝustatempe. Labori estas por ŝi kvazaŭa honorafero. La leĝo punas la edzinojn, kiuj forlasas la geedzan hejmon. Sed, se pasas iu gripo, tuj saltu sur la mikrobojn, kaj restu iom da tempo en lito. Nur ĝis la edzo rimarkos, ke io ne estas en ordo en la domo. Tio ne estas afero de racia diskuto, ĉar la kondutoj estas kondiĉ-itaj de la kutimo. Tio estas nur afero de konsciiĝo, kio povas ekaperi nur per konkretaj agoj.

Jacqueline.

Pri la virina problemo  
\*\*\*\*\*

La virina problemo fontas el la kreo mem de la unua virino, kiun "Dio" eltiris, laŭ la Genezo, el la dudekkvina ripo de Adamo. Kompreneble, tiu ripo estis, laŭ la tiama parolmaniero, la Adama sekso en erekto, kies malmoleco kaj movebleco similas al tiuj de vera - sed staranta - ripo dum spirado. Plie, tiu analogajo instruas, ke la ina gameto fontas el la vira sekso, kaj la vira el la ina. Necesas ja iom da "salto" - aŭ spritemo - por kompreni la Biblion.

Oni povas tute prave diri, ke la kreo de la unua virino konsistigis la unuan veran eraron de tiu fuŝentrepreno : la Di-kreado, ĉar ĝi ebligis la hommultobliĝon kaj la konsekvenca forpelson el la Eden-ovolo aŭ ĝardeno.

Sekve, estas tute normale, ke la virino iĝu poste konsiderata kaŭzo de la Edena Feliĉo. Sed la vera kulpinto, erarinto kaj pekinto restas "Dio" mem, kiu aŭ ne kapablis antaŭvidi, kvankam ĉionscianta, la neeviteblajn konsekvencaĵojn de sia kre-ago, aŭ ne kapablis rezisti, kvankam bonkora kaj ĉiopova, al sia propra kre-emaĉo. Cetere, Dio, la Patro, la Filo, la Sankta Spirito, la Eternulo, la Granda Mistero nur estas nomoj de la diversaj avataroj, aŭ senĉesaj diseriĝoj kaj rekonsistiĝoj materiaj, kies konstanta sinsekvado konsistigas mem la Eternan Procezon, aŭ Principon, de l'Ekzistado kaj de la Vivo.

Kompreneble, estas vane provi kulpigi kiun ajn pro tiuj pure magnetaj reagoj materiaj. Ili estas naturaj fenomenoj nur konstatendaj kaj elportendaj.

Same vane, malracie kaj malutile estas neadi la naturajn diferencojn ekzistantajn inter la viroj kaj la virinoj, tiel fizike, kiel psike, kaj ties konsekvencaĵojn neeviteble neprigatajn en la ĉiutaga kaj ĉiesronda kunvivado.

La rimedo al tiu natura stato estus la planado kaj la establo de sociordo, kiu harmoniigus la rilatojn inter la kvar naturaj socielementoj, t.e. : la viroj, la virinoj, la maturaĝuloj kaj la infanoj.

Tiacele, necesas frakasi tiun "sorĉan" ringon aluditan de Nicole en la debato pri "Ĉu mita proletara revolucio?", kiun konsistigas la kvar artefaritaj socielementoj de la

nuna sociordo, kiuj, helpe de diversnomaj kolektivoj, oficialaj aŭ ne, mastras la popolojn, kvazaŭ gregoj, t.e. : la aristokrataro, la teokrataro, la teknokrataro kaj la demokrataro, kaj anstataŭigi ĝin per vere popola memmastrumada socio aŭ sociano. La popoloj ja ne bezonas "kratarojn".

Kiam la homoj ekkonscios, ke libereco finiĝas tie, kie komenciĝas interhelpo ; ke egaleco nepre postulas solidarcon, t.e. samsortecon ; ke frateco ne povas daŭre ekzisti ekster tuthomara vivkonekseco, t.e. kamaradeco, tiam Vero, Amo kaj Justo regos la Tuthomaron. Tiam la homoj tute normale kaj memvole uzos la saman lingvon, samkonscios pri la realeco, samagados por sama celo kaj samĝuos la saman sociordon. Ili estos, laŭ la Evangelia aserto : "kvazaŭ anĝeloj en la ĉielo", kaj la nunaj sociproblemoj aspektos al ili nekredeblaj ŝercaĵoj, precipe la virina, ĉar, laŭ Kristo, "la viroj ne edziĝos, kaj la virinoj ne edziniĝos".

Sed por alveni al tiuj "kantantaj morgaŭoj" nepre necesas iom da tuthomara bonvolemo, ankaŭ taŭga "pesilo" kaj... ke Eva denove plufidu la "Serpenton".

Tiel diris Julio Ŝtrumpfo.

B.G.D.

\*\*\*\*\*

En Francio, nun... se ne kantas, almenaŭ ridetas la hodiaŭo. \*\*\*\*\* Pluraj pozitivaj rezultoj (Larzako, Plogoff, mortpuno...) esperigas multajn aliajn - eĉ se restas maltrankviligaj multaj aferoj, du milionoj da senlaboruloj, plia atomŝipo, kaj la plia kultado al kreskado...

Eĉ la franca E-istaro, kiu jam de longe aspiras al leĝo favora al enkonduko de E en la duagrada lernejojn, apenaŭ povas kredi, ke ĝi maldormas : Mitterrand promesis diskutigi tian leĝproponon en la Parlamento, kie la socialista grupo kun absoluta plimulto povas akceptigi nun la proponon, kiun ĝi iam faris tiurilate. Imagu ! Ni, E-istoj riskas baldaŭ troviĝi en samtempe enviinda kaj ege zorgodona situacio... Mi invitas do al jena debato en la venontaj "Laŭte !" : Kiam tiu leĝo ekzistos, kiel ni elturniĝu por ne tro ridinde fronti niajn respondecojn ? Kie trovi E-instruantojn ? Ankaŭ nefrancaj legantoj povas partopreni. La sinteno de Francio povus influi ankaŭ eksterlande... Kribo.



# ĈIES TRIBUNO

Racio, racio !

\*\*\*\*\*

En Laŭte n° 35 (53) mi legis kun miro, ke "esperanto ne estas sufiĉe racia por sukcesi". Kial ? Interalie tial ke ĝia alfabeto enhavas literojn kun supersignoj. Tiu kritiko periode revenas en la esperanta gazetaro kiel la mara serpento en aliaj.

Nu, kial funde ? Esence tial, ke supersignoj ne ekzistas en la usona alfabeto.

Ĉu do ĉio ne-usona estas ne-racia ?

Ekzemple : la metra sistemo. Dum ĉiuj landoj en la mondo unu post la alia ĝin adoptas (inkluzive Britio), nur Usono obstine rifuzas ĝin. Motivo : ĝia adopto necesigus multekostan ŝanĝon en la ilaro de la usona industrio (same kiel la aĉeto de la malbenitaj supersignaj literoj).

Mi vidas duan motivon, ne konfesatan : Usono strebadas disvastigi sian angladevenan mezursistemon pro industria imperiismo. Tiel ĝi jam sukcesis universaligi sian lingvon kaj siajn mezurunuojn en aernavigado : la tutmondaj aviadistoj parolas uson-angle (ofte ne tre kompreneble por la aŭdantoj), kaj kalkulas la altecojn per futoj (feet) kaj la distancojn per mejloj (miles). Ĉu vere racie ?

La aŭtoro de la koncerna artikolo proponas uzi

y	por anstataŭigi	ĝ
x	„	ĉ
q	„	ŝ

Tute simple !

Kiom da esperantistoj konsentus pri tiaj fantaziaĵoj ? Sed ni provu sobre ekzameni la demandon.

Sen forlasi la principon : unu sono, unu litero, oni povus uzi :

ts	anstataŭ	c
y	„	ĉ
j	„	ŝ
do dj	„	ĉ
kaj x	„	ŝ

(Mexiko pr. Mehiko estus eble pli "racia" ol Meksiko).

Restus tamen ĉ kaj ŝ.

Mi ne vidus alian solvon ol ch kaj sh - kaj ni refalus en forlason de la fonetika principo !

Kaj kio pri ŭ ? Kiel ni distingus la prononcon de laŭ kaj de balau ?

Se tamen iuj nepre volas, ke esperanto fariĝu pli "racia", t.e. konforma al la usona alfabeto, nu, kial ili ne fariĝas idistoj ? Laŭ ilia kriterio, ido estas ja pli "racia" ol esperanto (kion ni tute kontestas).

Tial ido, pli malmultekoste kompostebla en usonaj presejoj, devus esti multe pli disvastigita ol esperanto. Estus kruele insisti...

Alia riproĉo estas la ekzisto en esperanto de vortoj kiel lodo kaj hubo. Oni povus aldoni plurajn nomojn de mezurunuoj troveblaj en la Biblio, kaj de neniu nun uzataj. Se tamen mi legas ilin en traduko, mi deziras scii, kion ili signifas. Same kiam mi trovas hubo en verko de Grabovski.

Koncerne lodo, ĝi ja tiel arkaikiĝis en la unua senco, ke oni povas tute senĝene uzi ĝin en la dua, tute alia (PIV.2).

Konklude : estas utile konservi en plenaj vortaroj arkaikajn vortojn, eĉ se balastaj, same kiel arkaikajn formojn, ekz. ĥino = ĉino.

Valo.

Respondo al superflua sed oportuna rebato

\*\*\*\*\*

Mi konsentas kun Ĵaklino, ke neperforto estas maniero batali, sed tio ne estis la temo de mia kontribuo al la debato pri "Ĉu bankrotis la Racio ?".

Mi diris : "Cetere, estas grava eraro prezenti Kristo-n nur kiel Dion de Amo. Se Li fakte diris : "Amu vin, kiel mi vin amis.", Li diris ankaŭ...ktp."

Do mi ne kontraŭdiras, ke Li predikis neperfortecon, sed tio konsistigas nur unu aspekton de Lia duala personeco. Se Li predikis neperfortecon, Li mem uzis perforton por vipe forpeli la monŝanĝistojn el la "Templo", kaj por renversi la tablojn de la kolombvendistoj, dirante : "Vi faris el la

Domo de Mia Patro rabistan kavernon !".

Esprimo hodiaŭ vere topika.

En Sankta Mateo, 10-34, Li krude diras : "Vi ne supozu, ke mi venis por enkonduki pacon sur la Teron, mi venis por enkonduki ne pacon, sed glavon !", kaj tuj poste, 11-12, "De la tagoj de Johano-Baptisto la Regno de la Ĉielo estas perfortata, kaj perfortuloj kaptas ĝin."

Konklude, eblas nur konstati, laŭ tiuj Evangeliaj asertoj, ke se Kristo predikis neperfortecon, Li mem uzis perforton, celis alporti perforton sur la Teron kaj kvazaŭ laŭdis kaj rekomendis perforton por atingi al la Ĉielo.

Nur tion mi deziris substreki per mia rebato.

La rilato inter Barbusse kaj la Biblio estas lia fama libro titolita : "La Fajro", kiu priskribas la unuan Mondmiliton 1914-1918. Sed dum Barbusse priskribas nur Eŭropan okazintaĵon limigitan en la Tempo, la Biblio priskribas la Tutteran konflagracion aŭ disetendiĝon de la tuthomara "fajro" surface de la Tero, de ĝia komenciĝo ĝis ĝia fino, kaj tial fariĝas la anticipa Libro de l' Antikveco, kaj plano por la Estonteco.

Ke la homoj estas fajro, tion mem asertas Kristo, dirante al siaj apostoloj : "Vi estas la salo de la Tero". Kaj la salo estas la lasta formo de ĉio ekzistanta, t.e. de la universala radiado refariĝinta polvo, remateriiginta. Sekve oni facile komprenas, kial Kristo diris : "Mi venis por ekflamigi fajron sur la Tero, kaj kiom mi deziras, ke ĝi ekflamiĝu!", kaj al siaj apostoloj : "Iru kaj disprediku Mian Evangelion ĝis la ekstremaĵoj de la Tero !". Sekve, estas ankaŭ facile kompreni, kial, de tiu momento, milito ne ĉesis surface de la Tero. Antaŭ Kristanismo ja aliaj religioj laŭvice samcele zorgis kaj oficis. Nenio nova sub la Suno, kaj Kristo estas ankaŭ nomita : "Suno de Tagmezo".

La flamanta arbusto de Moseo simbolas la eternan agadon de la fajro (Kristo) en sino de la materio (Maria, kruco, Perdo de l'Ĉielo kaj ĉilo en la intestaro de la makrokosma homo). Koncepto atingebla nur supre de la Monto aŭ kono. La arbusto plie signas la vegetalan regnon, kaj la flamoj la animalan. Kriston simbolas ankaŭ la kupra serpento, kiun Moseo starigis sur stango en dezerto por ke la malsanuloj rigardinte al ĝi resaniĝu, ĉar ĝi simbolis la celon

kaj la esperon, kiuj fuĝigis ilin el Egiptio.

Kompreneble, ĉio ĉi-supre skribita estas nur pura "ŝtrumpfaĵo", kiu celas nek persvadi, nek konverti vin, sed nur provi eklumi en mallumo.

B.G.D.

Ĉu bankrotis la racio ?

\*\*\*\*\*

Tiu ĉi novbakita abonanto de "Laŭte!" ricevis en la sama tago ĉiujn ĝisnunajn kontribuojn al la debato pri racio ; kiel diligenta abonanto mi legis en sinsekvo ĉiujn kontribuojn; kiel scivolema homo mi re-legis ĉiujn kontribuojn, eĉ plurfoje, por strebi malkovri la signifon de ĉiu kontribuo aparte kaj de ĉiuj kontribuoj kune ; kiel honesta viro mi devas nun konfesi, ke mi (preskaŭ) nenion komprenas pri la tuto.

La malfacilaĵo komenciĝis kiam mi legis la priskribon de la titolo de la debato : "Ĉu bankrotis la racio ?" Racia aliro al debato estas unue kompreni la temon, ĉu ne ?

Por ne havi antaŭjuĝon pri la afero, mi kontrolis la vortojn en Plena Vortaro. Jes, tute klare, 'bankroti' povas signifi "fiaski" aŭ "malsukcesi" ; 'racio', tamen, estas, (egale tute klare kaj en bona akordo kun mia antaŭa kompreno), "kapablo koncepti kaj aserti la universalajn principojn de vero kaj kompreneblo, per tiu la intelekto de homo diferenciĝas je tiu de besto." Problemo ! Kiel povus bankroti kapablo ? Kapablo povas perdiĝi pro nesufiĉe ofta uzado, aŭ povas eluziĝi pro tro ofta uzado, sed bankroti ? Mi ne komprenas.

Mi do iris al Plena Ilustrita Vortaro. Imagu, se vi povas, mian surprizon. En PIV la radiko estas adjektiva, "racia", kun signifo : 'konforma al la racio...', sed racio estas nun : 'tiu parto de la mensa strukturo, kiu servas al la homo por malkovri... la leĝojn de la universo...'.

Esperanto vere estas malfacila lingvo ! Tamen, eĉ la klarigo en PIV ne helpis min kompreni la signifon de la demando, Ĉu bankrotis la racio?

Kaj plurfoja legado de la kontribuoj neniel helpis min

kompreni tiun demandon. Mi povas nur kompreni, ke iu subkompreno de la vorto, racio, estas konfidita al viaj kontribuintoj kvankam rifuzita al mi. Sed almenaŭ mi povas, post tiuj kontroloj en PV kaj PIV kompreni kial "Laŭte!" ricevis tiom da malsimilaj opinioj : ĉiu verkinto adresis sin al propra kompreno de la vortoj.

Verŝajne ankaŭ Jacqueline devis fronti la malfacilaĵon kompreni la demandon, sed, tre lerte, ŝi sin adresis al nova demando : "Ĉu bankrotis racio aŭ raciismo ?". Nu, mi subkomprenas, ke Jacqueline bone scias, ke "io" bankrotis, sed ŝi ne scias, ĉu tiu io estas racio aŭ raciismo. Ĉar tute evidente, laŭ mia ĵusa klarigo, racio ne povas bankroti sed nur perdiĝi aŭ eluziĝi, la vera signifo de la demando de Jacqueline estas, Ĉu bankrotis raciismo ? -- kaj tiun demandon mi povas kompreni.

Sed tio ne signifas, ke mi samopinias kun Jacqueline! Ekzemple : "Raciismo estas la religio (mia substreko) laŭ kiu homo devas dediĉi siajn fortojn... al unu afero: la Racio (mia substreko : ŝia majusklo), kaj por tiu celo rezigni pri ĉio, kiu ne estas racia." Nu, antaŭ ĉio, raciismo ne estas religio, kaj por pensi, ke ĝi estas 'la' religio estas, miaopinie, absurdaĵo. (Kontrolu mem la signifon de 'religio' en PV kaj PIV.)

Ekzemple : "...homo fariĝas homo per ununura afero : Racio (ŝia majusklo)." Sed la difino en PV, kiun parafrasas Jacqueline, estas, ke racio estas la kapablo..., per kiu la intelekto de homo diferenciĝas (mia substreko) je tiu de besto. Estas granda diferenco inter la du difinoj, ĉu ne ? Mi preferas tiun de PV.

Dum pli ol ok paĝoj, Jacqueline kuras post tiu erara hipotezo, ke raciismo estas religio, ĝis ŝi starigas la demandon, 'Kiel konkludi?'. Kaj mi subtenas ŝian konkludon, ke racio estas vivneceso, kvankam se mi vortumas ĝin, mi skribus, ke 'racieco estas vivneceso'.

Kaj mia konkludo estas, ke ĉiutage ni konstatas pruvojn, ke homoj agas racie, kvankam mi ne asertas, ke ĉiu homo ĉiam agas racie. Ni pensu pri Pollando, ekzemple, kaj ni vidas la triumfon de racieco super malracieco, kiam la registaro akceptis la fakton de la ekzisto de,

kaj kliniĝis antaŭ la, nova demokratia vento. Ni vidas, ankaŭ, ke la bankieroj de la okcidentaj landoj agis racie, kiam ili decidis, antaŭnelonge, ne bankrotigi Pollandon sed doni pli da tempo por repago de la grandegaj sumoj ŝuldataj al la okcidento, ŝuldoj kiuj estas pruvo, ke ne ĉiam racieco regis tiun landon.

Lorenzo.

LM, Rotterdam, 1981-04-19.

Uzita papero, supersignoj, pronomoj  
\*\*\*\*\*

La evangelian vorton jam prizorgas Jakelin kaj "L'Union rationaliste". Mi pli ŝatas ironiajn anekdotojn; pro tio, kiam okaze de tute neformala interparolo pri "Monato", TK tute preterteme skuis miajn antaŭjuĝojn per nuraj kelkaj vortoj - ĉar li, se mi bone komprenis, mem presas la gazeton - tiam ricevis mi okazon maltrankviligi bedaŭrinde ofte antaŭjuĝemajn mediulojn.

Notindas, "Monato" uzas recikligitan paperon por mezaj paĝoj nur por plaĉi al la legantoj, kaj se aliaj uzantoj estas en simila situacio, tiam estas facile imagi, ke la posedantoj de la specialaj fabrikoj povas senpune postuli maldecajn prezojn sammaniere kiel la vendistoj de ĉiuspecaj "sanvaroj".

Mi timas, ke la griza, polveca papero kara al L.A. ludas en la nuna socio okcidenta saman rolon kiel la "sanktaj" amuletoj de Mezepoko kaj nuntempa Polio.

...

Al la q-x-y-ema Pierre Meunier-Guttin mi rimarkigas, ke la greka, rusa kaj I.F.A. valoro de x ne estas ĉ sed ĥ. Cetere, tiu ĥ estas la sola problem-okaziganta litero, ĉiuj ceteraj povas esti ĉapelitaj sen ĝeno por legebleco per preskaŭ kiu ajn supersigno (ekz-e : " , ' , ` , ~ , ~ , - ) kaj ĉ, ŝ eĉ per subsigno de turkaj klavaroj kiel ç, ş aŭ eĉ per komo (tiel oni skribas la francan ç per sveda skribmaŝino : ç). Ĵ kaj ĝ laŭbezone povas esti skribataj ĵ kaj ĝ aŭ ĵ, ĝ se vere neniu supersigno troviĝas sur cia plej stranga skrib-



maŝino. Ĉiukaze, krom por  $x = \hat{h}$  (temas pri malmultaj vortoj kaj plejofte malbele presita litero) estas nun tro malfrue por ŝanĝi la alfabeton de esperanto tiel etnocentrisme. Pripensu nur, ke la plejparto de la homaro uzas tute aliajn skribmanierojn, ofte multe pli belajn kaj ne diskriminaciantajn la maldekstre skribantajn homojn. Racie, internacia lingvo devus uzi alfabeton skribeblan kaj de dekstra- kaj de maldekstramanuloj kaj la skribmaniero tiam verŝajne estus vertikala. La konsonant-sistemo povus esti raciigita, kvankam tiu tasko estus ege malfacila kaj la praktika rezulto ne nepre sufiĉe plibona ol la nuna sistemo. Ĉiukaze oni okaze de la kreo de tiu nova alfabeto povus priatenti multajn demandojn kaj laŭfakajn postulojn de la moderna mondo, sen forgesi belecon. Tamen, tiu supersigna debato inter novriĉuloj de la okcidento devas akre tikli la - malmultajn - samideanojn cetermondajn, kiuj tutcerte ne posedas skribmaŝinojn eĉ por siaj gentaj lingvoj, kiam ili ne apartenas al la riĉularo.

...

Fine. Mi proponis "hi" el la finna "hân" moke al tiuj naciismaj Francoj, kiuj blekas, kiam la francismoj en kiuj dronas esperanto riskas esti anstataŭigitaj. Verŝajne oni devas esti leginta la azenaĵojn de la O.E.O.-a numero de L.K.K. por kompreni kigrade la francoj emas forgesi sian propran imperiismon. Ĉio, kio aspektas angle, ne nepre estas bona nek malbona; Ewa estas pola antaŭnomo malgraŭ la "germana" w kaj Eve estas sveda kooperativa margarino verŝajne pli uzebla por bugri Adamon ol por funkciigi redakciajn skribmaŝinojn ĉe IBM, la entrepreno kiu merkatigis multalfabetajn skribpilkojn, haveblajn en Svedio je la prezo de botelo da bonkvalita brando.

Bedaŭrinde estas Kribo jam abstinulo, kaj lia Japy-maŝino ne akceptas pilkojn, tial ne eblas daŭrigi la alfabetan debaton sen endanĝerigi lian hararon.

Vito.

Noto de Kribo: Trankviliĝu! Baldaŭ mia hararo riskos plu nenion.

\*\*\*\*\*

▽

Tra Eŭropo per fervojo  
kaj Esperanto (fino)

... Kvankam mi antaŭvidis, ke la amikino ne venos, mi tamen iris al la restoracio de la orienta stacidomo de Berlino por la rendevuo, por kio mi estis skribinta al ŝi de Slovakio.

Tie la pruso, kiu zorgis pri la kaso, estis tiom afabla kiom estas multaj ŝtatoficistoj de iu ajn publika servo de iu ajn lando. Mi komprenis, kial iam Zenon koleris en tiu stacidomo. Pri la oficistoj de la prefektejo de Strasburgo povas Zenon pensi nenion, ĉar tie li neniam estis. Do mi manĝis, kaj restis sidanta, plulegante slovakon antologion en Esperanto. La amikino ne venis. Post momento, eniris pluraj policistoj en uniformoj, inter kiuj la junulo, kiu dum la mateno tiom afable permesis al mi veturi al Berlino Okcidenta. Ili kontrolis la pasporton de viro, kiu devis ilin sekvi. Neniun alian ili demandis. Post ilia foriro, mi atente observis la rigardojn de la homoj en la restoracio. Mi atendis kvaronhoron, kaj foriris, unuflanke, ĉar mi sentis veni nervokrizon, aliflanke, por ke la amikino min ne trovu, se tamen ŝi venus. Mi serĉis en la koridoroj de la subtera trajno la direkton al Friedrichstrasse, kie estas la kontrolejo por reveni okcidenten. Tie alparolis min viro civile vestita. Mi ne komprenis, kion li diris al mi. Kutime mi bone parolas la germanan, sed mi tiam estis en la unua fazo de plorkrizo, kaj li havis fortan berlinan akcenton. Mi traktis lin kvazaŭ draganton\* kaj respondis en franca lingvo, ke mi ne komprenas. Li diris ion pri ia libro, sed ankaŭ tion mi ne komprenis. Mi ripetis en franca lingvo, ke mi ne komprenas. Li diris en la germana: "Jes ja: vi ne komprenas", kaj lasis min.

Kiam mi atingis la kontrolejon, jam venis la larmoj. Mi pensis: "Se ili demandas, kial mi ploras, mi demandas,

\* dragi: francisma neologismo = rakonti stultaĵojn al homo kun la videbla celo seksumi kun ŝi aŭ li.

ĉu eble ili havas leĝon, ke plori oni ne rajtas". Ili ne demandis. Mi erare montris al policisto mian transitvizon de Polio al Francio, kaj devis serĉi en mia mansako la berlinan vizon. Mi diris lacege: "Estas tiom da paperoj en via respubliko, ke oni neniam trovas la ĝustan". La policisto, kiu kontrolis la fotojn de la pasportoj, postulis, ke mi aspektu pli gaje, ĉar ili havas leĝon, ke oni devas simili la foton de la pasporto. Mi estis tre juna, kiam antaŭ 9 jaroj mi faris la foton, pli inteligente mi faros foton por mia venonta pasporto.

Alvenante en la okcidenta subtera trajno, mi decidis iri al la nova memorpreĝejo, ĉar mi pensis, ke tiu moderna blua preĝejo helpas repacigi miajn nervojn. Bedaŭrinde por malsanuloj, estis sur la placo granda germaneca foiro, kaj ĝian bruegon oni aŭdis eĉ en la preĝejo. Sur la placo estis ankaŭ granda reklamo, kiu konsumis elektron por vantĵurnalon, pri kiu vi multon scios leginte la romanon de Böll pri Katarina Blum. La preĝejo estis tute simpla, kiel estas kutime ĉe lutheranoj. Estis ŝildo memore al la martiroj de la evangelia kredo inter 1933 kaj 1945. Super la altaro, sur blua fono, estis grandega orkolora statuo de Kristo. Dum mia unua restado en Berlino, antaŭ 9 jaroj, mi kredis, ke la statuo reprezentas kriston sur kruco. Post mia reveno, tion mi diris al juna pastoro, kaj li respondis al mi, ke mi malbone vidis, ke en la memorpreĝejo de Berlino estas kristo en gloro. Nun mi vidis, ke la amiko pravis, sed tion oni vidas nur, se oni atentis. Mi restis en la preĝejo ĝis la fino de mia plorkrizo, t.e. sufiĉe longe. Dum tiu tempo estis diservo, ĝi temis pri la azenino de Balaam, sed mi ne multon komprenis.

Poste mi iris al la stacidomo, kaj serĉis la atendejon, sed neniam mi povis trovi, ŝajne atendejo ne estas en la stacidomo de Berlino Okcidenta. Mi alparolis junulojn: "Laŭ vi, kion francoj povas opinii pri germanoj? Hodiaŭ matene mi volis unu glason da lakto, estis tuta germana matenmanĝo, sed unu glaso da lakto ne estis. La lakton mi iris trinki ĉe la aliaj. Nun mi havas trajnon post tri horoj, estas tie ĉi frizisto, estas tie ĉi floristo, eĉ estas aŭtomato por kontraŭbeboj kaŭĉukaĵoj, sed mi bezonas nur unu seĝon, kaj unu seĝo senpaga ne estas".

Ili demandis min: "Ĉu vere nur unu seĝon vi deziras?" Ĉar dum la mateno dufoje berlinanoj min demandis, ĉu vere unu glason da lakto mi deziras, iom nervoze mi respondis: "Kion alian ol unu seĝon oni reale bezonas, kiam oni atendas trajnon, tion mia franca logiko neniam povis kompreni. Vidu, francoj estas tiom primitiva popolo, ke ili ankoraŭ imagas, ke stacidomojn oni konstruas, por ke tie homoj atendu trajnojn. Prave elzacoj diras: "Freneza estas la franco, ĉar li havas kokon en la kapo, sed aglon havas la germano". Ili konsentis, ke komike estas, ke nur unu seĝon mi bezonas, kaj ĝin en tiom giganta stacidomo ne ricevas, sed diris, ke pri Francio, Germanio kaj Elzaco ili nenion povas diri, ĉar ili ĉiam vivis nur en Berlino. Benkoj estis meze de la kajoj, meze de vintro, meze de nokto, meze de Nordeŭropo. Mi pensis, ke senpage oni povas sidi en la preĝejo, sed malfacile oni povas esti en preĝejo kun valizo, kaj tie ne estas necesejo. Fako por valizo kostas du markojn. Pomsuko kostas en la stacidoma trinkejo du markojn kaj dudek pfenigojn, sed, ĝin paginte, oni ne bezonas repagi por pisi. Per tiuj signoj mi rekonis la kapitalistan paradizon.

Do mi iris en la trinkejon, kie plu deĵoris la tunizia kelnero, kaj mendis pomsukon. Mi babilis kun germanino, kiu ŝajne estis konvinkita pri la supereco de la germana kulturo, sed ne estis rasista, kompreneble... Poste tunizia gastlaboristo demandis min, ĉu mi deziras plian glason da pomsuko, kaj mi diris apud la oreloj de la kelnero: "Jes, ĉar ne estas lakto". La kelnero alportis bieron al sia samlandano kaj duan pomsukon al mi. La gastlaboristo demandis min, ĉu mi estas edzino. Mi respondis: "Tiom ofte demandis pri tio viroj en trinkejoj, ke mi intencas fari por mi ŝildon, sur kiu estos skribite: "Ne, mi ne estas edzino", por ke ili ne bezonu min lacigi per la demando". Li demandis, kial mi koleras, mi respondis: "Ĉar mi tre ŝatas originalecon". Li ankaŭ demandis min, ĉu mi volas tranokti en lia hejmo, kaj mi respondis elkore: "Vidu, la nuran ideon, ke morgaŭ matene mi povus esti en ia alia loko ol mia propra hejmo mi tutsimple ne povas elteni". Ĉar pli li ne havis por demandi, li vokis

la kelneron, li pagis sian bieron, mi pagis miajn du pomsukojn, kaj li foriris. Post lia foriro vorte agresis min berlina ebriulino. Mi ne bone komprenis, sed supozis, ke ŝi demandas, kial tiom facile mi lasas foriri mian amikon, do mi respondis: "Li ne estas mia amiko, ĝojinde malembarasita mi estas nun pri li, do ĉio estas en ordo". Funde de la trinkejo kaŝe ridis junulo, sed eble nur, ĉar mia respondo havis nenion por fari kun ŝiaj diroj. Ŝi plu parolagresis min, sed, ĉar la ebria-berlina estas de mi nekonata lingvo, ŝi plu insultis min, kaj responde mi diris laŭte en franca lingvo, kion mi opinias pri ŝi persone, kaj ĝenerale pri geebriuloj kaj pri ambaŭflankaj berlinanoj. La nedialogo daŭris longe kaj plu kaŝridis la junulo. Mi pensis, ke li pravos, ĉar pli bone estas ridi ol plori, eĉ en Berlino. Mi ne scias, ĉu la tunizia kelnero komprenas la francan, al mi nur germane li parolis, kaj al la ebriulino li portis konjaken post konjako tuj, kiam ŝi estis fininta glason, ĉar ju pli da konjako li vendas en Berlino Okcidenta, des pli rapide li povos reveni kiel riĉulo al Tunizio.

Kiam alproksimiĝis la horo de mia trajno, mi foriris.

Mi kuŝis en la rezervita loko. Baldaŭ alvenis GDR-a policisto kaj postulis 5 markojn por la transitvizo. Ĉar plurfoje mi veturis de Strasburgo al Berlino Okcidenta sen pagi kaj eĉ sen montri pasporton, mi diris, ke transitvizon mi ne bezonas. Li respondis kun tono de absoluta logiko, ke oni ne povas transiti sen transitvizo. Mi diris: "Bone, ĉar mi ne certe scias, mi donas al vi 12 frankojn, kaj poste mi demandos la ambasadejon de GDR en Parizo, ĉu tio veras". Li diris, ke li ne zorgas. Sed poste li vidis la transitvizon, kiun mi ricevis la antaŭan vesperon en Frankfurt ĉe Odoro, kaj diris, ke mi ne bezonas repagi. "Do, mi demandis, ĉu mi estas en ordo?" "Ne, li diris, vi estos tuj, kiam mi estos stampinta vian pasporton". Mi diris kun rezignacia tono: "Kial mi diskutu pri unu stampo pli aŭ unu stampo malpli, kiam da stampoj mi havas jam kvindek? Se stampi vi volas, vi povas stampi eĉ mian... pasporton". Do li metis du stampojn sur la pasporton kaj du stampojn sur la vizon por atesti, ke mi veturas de Berlino al Frankfurt ĉe Main,

sed, por ŝpari paperon, li uzis la paĝon, kie estis jam la stampo por iri de Frankfurt ĉe Odoro al Berlino. Tion farante, li levetis la ŝultrojn kaj diris kun sia daŭra tono de absoluta logiko: "Tiel simple oni ne povas vojaĝi". Tion mi konsideras kiel la definitivan adiaĵon de GDR al mia persono. Kiam mi havos monon por stulte perdi, mi aĉetos barbulan ikonon, kaj skribos sub ĝin: "So einfach kann man nicht reisen" (Sed mi ne scias ĉu komike tio aspektos).

Ŝajne skandalis miajn germanajn kunulinojn, ke mi respondis kun tia tono al germana policisto, eĉ orienta. Alvenis svisa fervojisto kaj demandis, kie li devas min veki. Mi sciis, ke la trajno iras al Bazelo tra Karlsruhe, sed la informservo de la strasburga stacidomo menciis, ke trajnon mi trovos en Frankfurt, do mi respondis Frankfurt, kaj plonĝis en bezonategan dormon.

Ankaŭ en Frankfurt ĉe Main mi ne povis trovi atendejon, sed estis laktotrinkejo, kaj mi pensis kun ĝojo, ke alproksimiĝas Alemanio. Mi ricevis glaseton da lakto, kaj mi trovis mangaĵon nomatan Muesli, kiu nek en Svisio nek en Elzaco indus tiun honoran nomon, tamen sufiĉe bongustis. Poste mi informiĝis pri la trajno al Strasburgo, sed okulfrape ĝi ne ekzistis. Do mi demandis ĉe la informservo de la stacidomo de Frankfurt, kiel mi povas atingi Strasburgon, kaj oni respondis: "Vi devos ŝanĝi en Karlsruhe".

Konklude

\*\*\*\*\*

Finfine mi alvenis en la stacidomo de Strasburgo por la tagmanĝo. La kelnero estis babilema. Mi demandis lin, en kiu banko marko estas akirebla por nur 2,25 FF, kaj li diris, je estas ja juste, ke ankaŭ elzacanoj profitu per germanoj. Cetere, diris li, 2,25 frankoj estas la kurzo por biletoj, sed monerojn oni akceptas nur por 2 frankoj. Li inicis min ankaŭ al la mistero de "koschtlos", sed tiu mistero estas revelacienda nur al pagantoj de lokaj impostoj strasburgaj.

Kompreneble, stultuloj min demandis pri komparaj meritoj de orienta kaj okcidenta Eŭropo. Mi respondis, ke multo mankas en Orienta Eŭropo, sed ke ankaŭ en la stacidomo de Berlino Okcidenta io mankas, kaj mi demandis ilin: "Laŭ vi, kiuj estas la aĵoj, kiuj mankas en Berlino Okcidenta?"



Maljuna elzacanino, kiu estis germanino dum 4 jaroj de sia junago, demandis ĉu eble en la stacidomo mankas la trajnoj, tio estis la plej inteligenta respondo, tamen neniu trovis la ĝustan respondon : mankas en Berlino Okcidenta senpaga seĝo kaj unu glaso da lakto.

Jakelino.

FINO !

\*\*\*\*\*  
Maljunulo rakontas...

N E M E N S O G U !

La patro de mia patro estis religiema, tre pia, ĉar jam lia prapatro estis tre pia... Tio en tre malnova epoko, kiam la popolo nombris siajn aferojn per cent, aŭ malofte per mil kaj "mil kaj mil", epoko antaŭ alumeto, centra hejtado, sen krano kun akvo varma aŭ malvarma...

La nombroj centmil, miliono, aŭ miliardo estis konataj de malmultaj sciintoj kaj la popolo devis zorge viziti preĝejon aŭ eventuale preĝi hejme, al sia sola kaj ununura Dio, kiu sendis sunon, pluvon, superakvigon aŭ malsanon, laŭ sia propra momenta humoro...

En tiu kondiĉo, kiam iam, post la fino de mia metilernado, mi estis devigita forvojaĝi (vd : Laŭte n-ron 30, nov.1980 "Feliĉlando") mia patro ŝovis - sen ke mi tion sciis - tre grandvaloran monbileton en mian preĝlibreton...

Okaze de mia eliro el hejmo - mia unua forveturo - mia patro rekomendis al mi : "Kiam de tempo al tempo vi ne povos preĝi, eĉ hejme, dimanĉe, irante al preĝejo, donu iom al almozkesto..."

\* \* \*

Post longtempa foresto mi revenis hejmen. Tio okazis iun dimanĉan vesperon. La tuta familio, najbaroj kaj amikoj estis tie por min revidi. Interalie mia patro min demandis : "Ĉu vi preĝis almenaŭ ĉiun dimanĉon, ĉar vojaĝante oni ne povas laŭvole preĝi ?" "Jes, mi respondis laŭtege, mi forlasis eĉ ne unu dimanĉon". "Nu, diris mia patro kaj sin turnis al mia patrino, donu al mi lian preĝlibreton el lia valizeto..." Kaj antaŭ la tuta ĉeestantaro li malfermis mian preĝlibreton kaj retiris la monbileton.

Mi esperas vivi tre longan tempon... Ĉar mi ne mortis pro honto en tiu momento...

-nm-

\*\*\*\*\*

A L E K S A N D R O  
O G O R O D N I K O V

"Mi ne kredas prava vian opinion, sed mi pretas batali, por ke vi havu la rajton ĝin esprimi." Viktoro Hugo.

"Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio... Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo." Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Aleksandro Ogorodnikov, sovetia civitano, naskiĝis en 1951. En la jaro 1973, protestinte kontraŭ la manko de libero en la Moskva Universitato, li perdas la rajton daŭrigi siajn studojn. Kvankam estas liaj gepatroj ateistaj, kaj li mem ĝis tiam fervore konvinkita marksisto, li konvertiĝas al ortodoksa kredo, probable pro influo de la filmo de P.P. Pasolini "La Evangelio laŭ Mateo".

Kun amikoj li tiam laboradas por produkti filmon en la Nacia Kino-Instituto. Sed dum hejma polica traserĉado la dokumentoj koncernantaj tiun filmon estas konfiskitaj kaj li estas forpelita el la Kino-Instituto, kie li studis de tri jaroj. La sekvantan jaron, li fondas filozofian kaj religian studrondon. Sinsekve li laboras kiel pordisto, purigisto, noktogardisto... sed ĉiam kaj ĉie, baldaŭa maldungiĝo sekvas la dungigon. Li kaj liaj amikoj devas ofte ŝanĝi la loĝejon, perdas sian vivrimedon, spertas senĉesan spionadon kaj diversajn ĝenojn, ĉikanojn, turmentojn far la polico.

En 1976, li perdas sian lastan oficialan laboron kiel gardisto en tuberkuloza kliniko. K.G.B. kunvokas lin kaj liajn amikojn kun akuzo, ke ili apartenas al "kontraŭ-sovetia studrondo". Pluraj el ili estas devigataj al kiracperiodo en psikiatria hospitalo, suferas policajn traserĉojn, pridemandojn, konfiskon de libroj. De tiam Ogorodnikov

perlaboras sian vivon en la kamparo, kultivante ĝardenon, kies produktaĵojn li vendas. Sed tamen pluvivas la stud-rondo.

En 1977, du longaj artikoloj aperintaj en "Literaturnaja Gazeta" sub la titolo "Libereco kaj kalumniatoj" akre atakas la rondanojn kaj Ogorodnikov respondas per aperta letero kaj partoprenas en gazetkonferenco. La monaton poste, li estas devigata al kuracado en psikiatria hospitalo n° 4 en Moskvo. Sekvas policaj esploroj, traserĉoj, sinsekvaj arestoj kaj liberigoj.

Fine, la 20an de novembro 1978, li estas arestita, juĝita kaj ricevas kondamnon je unujara restado en laborkoncentrejo pro "parazitismo". Tiam Amnestio Internacia adoptas Ogorodnikov'on, komisiis tri el siaj grupoj lin defendi (en Francio, Germanio, Svisio). Li estas tenata en ekstremorienta Siberia centrejo. Dume, unu post la aliaj estas arestitaj liaj geamikoj, kaj malaperas en karcerojn aŭ en psikiatrejojn. Fine de sia puntempo, li estas ne liberigita sed transigita al Leningrad por esti pridemandata, kadre de procesa enketo kontraŭ samrondano Poreh, kulpigita je kontraŭsoveta propagando.

En septembro 1980, li mem denove estas juĝata kaj kondamnita je sesjara punlaboro plus kvinjara relegaĉio.

Amnestio Internacia  
grupo 239 Sarlat Francio.

## Vivo de "Laŭte!"

Tiu ĉi aparte dika numero de "Laŭte!" entenas la Adresaron por 1981. Bonvolu la abonantoj mem tranĉi supre kaj faldi por disponi pri facile uzebla, kvazaŭa jarlibreto. Ĝoju ili : la nombro de la abonoj (nun 287) ja proksimiĝas al 300, spite la fakton, ke nia bulteno restas preskaŭ tute nekonata ekster Francio, kie loĝas 80% el la abonantaro. Sed prefere malrapide kaj certe, ol tro rapide kaj artifice, ĉu ne ?

La venonta numero aperos komence de septembro.

Kribo.

S. Aarse - Naciismo kaj Esperantismo  
Broŝurservo de SAT, 1981.

Post la verkoj de Lanti, la temo anoncata per la titolo de tiu ĉi broŝuro povis ŝajni elĉerpita. Tamen S. Aarse alportis al ĝi gravan novan kontribuon.

Trifoje ĝin leginte kun atento, mi rezignas resumi ĝin. Neebla tasko : ĉar tiu maldika broŝuro estas tiel densa, tiel enhavoriĉa, ke neniu detalo estas neglektinda. Ĉiu frazo valoras atentan legon, ĉiu alineo meritas mediton.

El ĝi mi eksciis multajn historiajn faktojn kaj eventojn, kies tuto kreis kaj kreskigis la naciismon ; pli ĝuste la diversajn naciismojn : ĉar la nocio "nacio" estas tiel konfuza, ke neniu ankoraŭ trovis adekvatan difinon pri ĝi, kaj la naciismo varias laŭ loko kaj tempo. S. Aarse elŝeligis multajn el ĝiaj aspektoj, lumigis ĝin laŭ multaj facetoj, en stilo neniel pedant-afekta. Malgraŭ la kompleks-eco de la temo, ĉio estas klara kaj pasiige interesa.

Mi nur ĉikanetus pri iafaĵa uzo de la vorto "raso", kiu havas nenian science bazitan signifon. (Mi preferus "etno" aŭ la zamenhofan "gento"). Sed la leganto bone komprenas la intencon de la aŭtoro.

Post tiu funda studo, k-do Aarse citas vortojn de Zamenhof. Ili montras, kia estis la opinio de la genia aŭtoro de esperanto, kaj kia lia sinteno kontraŭ naciismo. Per tiuj citaĵoj oni povas konvinkiĝi, ke Lanti kaj la sennaciistoj neniel deviis de la vojo signita de la majstro (aŭ pliĝuste ni diru, konforme al la deziro esprimita de tiu modesta pioniro : de la iniciatoro). Ni rajtas aserti, ke Zamenhof kondamnis ne nur la ŝovinismon, sed la naciismon en ĉiuj ĝiaj formoj kaj manifestaĵoj. Ni ne forgesu, ke pro unu el tiuj formoj, plej drasta kaj kruela, suferis kaj mortis pluraj el liaj familiaĵoj, inter ili la kar-memora Lidja.

Konklude : "Naciismo kaj Esperantismo" estas unu el la plej altvaloraj kaj plej utilaj eldonitaĵoj de la broŝurservo de SAT. Ne nur ĉiu SAT-ano, sed ĉiu esperantisto devus legi kaj primediti ĝin.

Valo.

## NIA FELIETONO

Antaŭ kvindek jaroj...

\*\*\*\*\*

TRA LA MONDO PER BICIKLO

KAJ ESPERANTO

Vladivostoko, la 5an de julio 1930.

La lasta tago de mia trasovetia vojaĝo estis unu el la plej lacigaj pro fortega vento kaj pluvego ĉirkaŭ la 9a. Mi kredis min ree en Vaskolando. Estis nur sinsekvo da valetoj, montetoj kaj "fals-ebenaĵoj". Ĉirkaŭ la 15a, de sur monteto mi ekvidas - ho, miraklo! - la verdan vastegon de l'oceano. Mia emocio estas nepriskribebla. Antaŭ mi, fjordoj, malebena marbordo, kie mi duonvidas klifegojn. Mi estas proksime de la stacieto UGOLNAJA, je ĉ. 50 km. de VLADIVOSTOKO. Kiel indikas ĝia nomo, ĝi estas karbminea regiono. Ĝis la 17a mi laŭbiciklas la maron kaj mi havas la impreson kvazaŭ mi troviĝus sur la rando de Bajkalo, tiel okulfrapa estas la simileco. Dekstre, la smeralde verda maro, maldekstre la montaraj klifoj.

Laŭlonge de tiu lasta etapo estas nur ĉaletoj por plezuro kaj ripozo. Do, Lazura Marbordo ! Estas eĉ subĉielaj ban-  
ejoj, kie svarmas banantoj. Veturas multaj irvenaj traj-  
noj, kiuj devigas min ofte halti. Aliparte, estas tiom da  
vento, ke ĝi trudas al mi halti je 30 km de la fincelo :  
mi komprenis, ke la aĉa vetero riskus endanĝerigi min.  
Vole nevole, kun ega bedaŭro, mi finis la veturadon en  
varvagono de ĉirkaŭurba trajno. Feliĉe, mi trovas tre  
afablajn kaj komplezemajn junulojn, kiuj helpas min en-  
vagonigi mian materialon meze de latkestojn da fragoj.

Kaj tiel je la 20a, senĝlora, mi atingas la stacidomon de Vladivostoko, sakvoje de golfo ĉirkaŭita de belaj montetoj, sur kies flankoj kuŝas la urbo. Mia alveno okazas nevidite, des pli ke torente pluvigas. Feliĉe, atendas min en la stacio esperantisto, k-do ZUY, fraŭlo, kiu senĝene invitas min siahejmen. Mi konsentas.

Vladivostoko, la 11an de julio 1930.

Malfacilaj estas la formalajoj por forlasi Sovetion. Unue, mi devas atendi ŝipon por Japanio. Due, kaj tio plej gravas, trovi monon por pagi kaj kunporti. Nu, la soveta leĝo estas rigora. Oni ne rajtas elporti pli da mono ol oni havis ĉe la eniro. Ĉar mi havis nur kelkajn dolarojn, mi ne povis pretendi elporti pli. Mi tuj diru, ke mi devis lasi tie mian tutan ŝparmonon. Malgraŭ ĉiuj miaj petoj, oni lasis min kunporti nur la monon por pagi la ŝipon kaj unu-du dolarojn. Leĝo estas leĝo, tion mi sciis, do, nenio direnda, ne utilas plendi.

Vladivostoko, 16an de julio 1930.

Hieraŭ, dimanĉe, grupo da francaj maristoj kaj mi konatiĝis en la klubo kun soveta esperanto-scipova maristo. Sekvis inter la maristaro, pere de mi, longa konversacio, dum kiu ili interŝanĝis ideojn, vidpunktojn, precizigojn pri sia metio en ĉiu lando. Konklude, ĉiuj esprimis la deziron, ke estu esperantistoj je la dispozo de la maristoj en ĉiuj mondhavenoj !

.....  
Mia aparato estas deponita en la muzeo de la Aŭtomobila Klubo de Vladivostoko.

Hodiaŭ mi vizitis ABTODORG. "Abtodorg" en la rusa signifas "aŭto" kaj "vojo", ĝi estas do la Aŭtomobila Klubo. Estas iom ridinde paroli pri aŭtovojoj en 1930, kiam estis efektive neniu vojo en Rusio, kies urboj havis senpavimajn kotplenaĵojn. Tamen, tiu organizo havas kiel celon ĝuste krei, starigi, faciligi la kuniĝon de aŭtomobilo kaj vojo. Ties agadkampo estas senlima, ĉar ĉio restas kreota. En ĉiu urbo ekzistas sekcio de Abtodorg, kiu eldonas bel-egajn revuojn. Nu, unue tiun organizon mi vizitis, ĉar ĉie ĝi pli-malpli "patronis" min, tial al ĝia muzeo mi



proponis mian aparaton.

(Noto : Poste mi eksciis, ke tiu aparato estis imitita, ĉar oni aranĝis en Sovetio raliojn per surrelaj bicikloj, kio pruvas kiel ege mankis la bicikleblaj vojoj.)

Estis interkonsentite, ke antaŭ ol deponi la "maŝinon" en la muzeon, mi faros demonstradon ĝuste en la mezo de la urbo, sur la ĉefstrato, kiu, ĉar plej bone pavimita, plej taŭgas por la afero. Tiun demonstradon, la lastan, filmos por la kinaj aktualaĵoj "SOVKINO".

Tiel okazis la 20an de julio 1930, dank'al mallonga vetera plibeliĝo. Tiu tago koincidis kun la "Nacia Tago de Aŭtomobilo". Tiuokaze estis aranĝita ralio de kelkaj aŭtaĉoj kaj ĉefe kamionoj kaj bicikloj, kiuj cirkuladas en la orienta ĉemara provinco. Mia elmontrado estis la ĉefsukceso de tiu tago, kiu gajnis al mi 200 rublojn per vendado, pli ĝuste likvidado de mia tuta ruse presita kartstoko. Eĉ en la ĉina kvartalo mi sukcesis rikolti per ili 15-20 rublojn.

Mi rajdis mian "triciklon" en mia kutima vetur-ekipaĵo. Ruliĝi sur pavimoj kaj makadamo ne estis facile, tial ke la direktilo estis blokita. Feliĉe, inter miaj simpatiantoj ĉiam estis iu por reloki min en la ĝustan direkton. Kompreneble, ankaŭ la strata polico "organizis" la elmontradon interkonsente kun Abtodorg.

Ankaŭ tie, estis deŝ pli granda apoteozo, ke ĝi estis filmita kaj diskonigita en la tuta Japanio kaj eĉ en iuj lokoj de Ĉinio ... kaj Siamo. Kiel ? Kial ?

(Noto de 1966 . Rilate Siamon, tiu lando iel similas al Sovetio, tial ke en 1930 mankis la vojoj. Tamen, kiam mi trairis Siamon, mi spertis malfacilaĵojn, ĉar tie jam troviĝis unu el miaj konkurantoj, kiu veturis sur reloj per biciklo kun aparato simila al la mia. Mi eksciis nur hazarde, ke li konstruis tiun aparaton, vidinte la kino-projekciadon de Vladivostoko.)

(daŭrigota)

ALFA-BETA

\*\*\*\*\*

*Verbarado de novaj "Laŭtuloj" estas ĉies afero!*



N U N    L A R Z A K O  
K O M E N C I Ĝ A S !

\*\*\*\*\*

La nova franca registaro ĉesigas la militistan okupadon kaj metis finon al la projekto plivastigi la milit-

istan trejnokampon.

Imagu, kiel ĝojaj kaj feliĉaj estis la terkulturistoj kaj iliaj geamikoj, kiuj rezistas de pli ol dek jaroj...

Sentoplenaj momentoj post tiu longdaŭra neperforta lukto fronte al ĉiutagaj ĉikanadoj fare de armeo, post multaj samtempe drastaj kaj riĉigaj momentoj.

Pasintan semajnon, dum la pentekostaj feritagoj, en Montredon sur Larzako, estis festo sub radia suno : la terkulturistoj gastigis la ĉeestantojn zorgante pri rostitaj ŝafoj, kukoj kaj vino... Sed ne bruemaj nek senbridaj manifestadoj : ĉiuj konscias pri la graveco de tiu venko kaj forte deziras, ke "Larzako" nun komencu aktive vivi, daŭrigante sian strebadon al alternativaj vivrimedoj kaj soci-organizado.

Oni diskutis pri multaj informoj, projektoj : la juĝaj finaranĝoj, la internaciaj porpacaj renkontiĝoj ĉi-somere, la GFA kiuj pluvivas, eĉ aperas la kvara GFA (Agrokultura grupo bona) por malhelpi spekuladon, invadon de miaj ajn "iniciatintoj".

Estas firma decidiĝo respondeci pri estonteco de Larzako.

Vere, la larzakaj rezisto kaj lukto estas ekzemplodonaj kaj esperplenaj, sed ankaŭ multvaloraj impulso-fortoj.

Nun GARDAM LO LARZAC ! V-vvv- V- VVV.

\* \*  
\*

La Internaciaj porpacaj renkontiĝoj sur Larzako okazos

\*\*\*\*\*

de la 17a ĝis la 23a de aŭgusto 1981. La vojo estos signal-

\*\*\*\*\*

izita apud Millau sur la N. 100 (direkte al Lodève). Surloke

eblos tendumi. Memstare aŭ grupe ĉiu prizorgos la manĝon. Jen la temoj antaŭviditaj :

1. Vetarmado. Militarizo de la socio. Militminacoj kaj internacia solidareco.
2. Malsato en la mondo. Uzo de naturaj riĉofontoj. Produktiveca terkulturo en la industriigitaj landoj.
3. Atakoj kontraŭ libereco kaj demokratio. Depresio akcelas rasismon. Centralizismo, plifortigo de ŝtato damaĝas al individuaj diferencoj, liberecoj. Civila socio. Ŝtato kaj partioj.

Esperantistoj havos lokon por interveni. Tiuj, kiuj deziras partopreni aŭ ricevi pli da informoj bonvolu kontakti K-inon Nicole Déjean, 14 rue Anatole France, F 82000 MONTAUBAN.

N. Déjean.

## SAT-BROŜURSERVO

\* Kiel anoncote en "Laŭte!" de majo, aperis por francoj "Abrégé pratique de la Grammaire Espéranto" (GE. 4 FF) de kdo LENTAIGNE : 36 paĝoj + 4-paĝa suplemento "Parler et enseigner", kiu donas konsilojn por bone paroli kaj instrui publike. La aŭtoro insiste avertas, ke temas ne pri Gramatiko, sed pri "katalogo da rimarkoj", kiu celas evitigi la ĉefajn erarojn kutimajn al la francoj. La vendprezo estas 4 FF + franko. La francaj broŝur-abonantoj aŭtomate ricevos ĝin kun 20% da rabato kiel kutime.

\* "El Verkoj de Lanti - 2" estas nun multobligita kaj kelkaj dekoj da ekzempleroj estas broŝuritaĵoj, do jam disponeblaj. 140 paĝoj, 15 FF. La entenataj tekstoj de Lanti ankoraŭ ne aperis libro-aŭ broŝurforme :  
- Tri Semajnojn en Rusio (1922), - Epiloge (serio da artikoloj, kiujn verkis Lanti antaŭ ol transdoni la gvidadon de SAT, 1933, - Diversaj kontribuoj aperintaj en "S-ulo" kaj "S.R.", - Fine, la fama recenzo "Tro Plena Gramatiko kaj ne sufiĉe Plena Vortaro" kun la respondo de G. Waringhien kaj la rebato de la recenzinto.

Kribo.

\*\*\*\*\*

Eldonoj de "La Kritikanto"

\*\*\*\*\*

K-do MINE Yositaka, nia japana peranto, ofertas al la legantoj de "Laŭte" jenajn librojn, kiujn li produktis. Nia broŝurservo akceptas mendojn kun samtempa pago, sed la menditajn librojn oni ricevos rekte el Japanio, nur post 2, 3 monatoj. Tiamaniere ni ŝparos duoblan afrankon. La prezoj indikitaj en francaj frankoj inkluzivas la sendkoston.

Miyamoto:Sarkasme kaj entuziasme (eseoj, 1979)	37,50 FF
Miyamoto:Skiza historio de la utao (1979)	25,-
Benczik:Studoj pri la esperanta literaturo (1980)	41,25
Elektitaj verkoj de V.Eroŝenko (1890-1952), la rusa blindula esperantisto, forgesita, sed merita por rekonado de la humaneco kaj originaleco :	
Vol.1: Lumo kaj ombro (1979)	20,-
Vol.2: La tundro ĝemas (1980)	20,-
Vol.3:Malvasta kaĝo (1981)	25,-

Recenzoj de la supraj libroj ĉiuj aperis en "Laŭte", respektive n-roj 20, 23, 26, 28 kaj 30, escepte de la vol.3 de Eroŝenko, kiu ĵus aperis.

Mia broŝureto de 32 maŝin-tajpitaĵoj folioj "LA MANIERO KIEL DIO ESTIS INVENTITA" ne estas per mia nura kapablo, eldonebla en 2500 aŭ 3000 diversaj regionaj lingvoj de la nuna mondo. Tial mi ĝin kreis en ESPERANTO, por ke la interesatoj povu ĝin traduki...  
La mondo enhavas proks. 3.000 000 esperantistojn. Pro tio mi opinias, ke la eldono estas interesa. Se vin interesas unu broŝureto en esperanto por vi mem, aŭ ĝia eldono, petu ĝin (kun sendkosto, neregistrite) kontraŭ 25 FF al :  
TRENNER, 166 av. Daumesnil, F 75012 PARIS. Pĉk:PARIS 3 941 39T.

En la broŝurlisto aperinta fine de la ĉi-kuna Adresaro 1981 de "Laŭte!" bonvolu aldoni :

Fronte al la Vivo ( Krishnamurti) FV.(3 FF)

Directeur & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

Margene de la 36a \*

\*\*\*\*\*

La plej bone organizita. Certe oni ne plu havos okazon kunveni en tiel rava loko kaj oni laŭdu Serge Sire kun lia helpantaro. Mi aldonas, ke la manĝaĵo estis tiel bona, ke mi ankoraŭ diskutas kun mia kuiristino...

Signoj de l'tempoj : la broŝuro de Lanti "For la neŭtralismon", kiu estas la fundamento de nia klasbatala movado, kuŝas en angulo de la multnombraj libroj... oni vane serĉus kantaron, oni ne plu kantas... Okazis ŝanĝo. Mi ne vidis tiujn strangulojn verde vestitajn de la piedoj ĝis la kapo.

Oni povis konstati, ke nun la junuloj pretas okupi la postenojn de la kadukaj gekamaradoj... eble kun alia spirito.

Atestas pri tio la propagandmaterialo : oni ne plu perdas sian tempon kun klopedoj nur en la laboristaj medioj sed oni iras ĉien por la sukceso de Esperanto. Oni tiel scias, ke Ĉinio, Iranio, Rumanio, Kubo k.a. favoregas nian lingvon. Oni povis eĉ vidi la respondojn de la kandidatoj al Prezidenteco.

La du grupoj "TESPA" jam konata kaj "Ruza Kruĉo" de Parizo prezentis al kongresanoj interesajn teatraĵojn. Sed margene mi restu. Vi ja legos la oficialajn raportojn en la Bulteno de SAT-Amikaro. Pluraj debatoj okazis. Mi partoprenis tiun kie oni diskutis pri rasismo. Neniu estas rasisto sed tiu, kiu loĝas en HLM (moderpreza loĝejo), kie svarmas islamanoj, havas alian vidpunkton ol tiu, kiu nur renkontas ilin.

Jen mia demando : Kiu socio kapablos laborigi tiujn loĝantojn de la nordaj kvartaloj de Marsejlo, kie EdF-GdF ĉesigis siajn servojn, kie junaj virinoj ne povas iri al dentisto, ĉar la edzo aŭ patro ne plu laboras de multaj jaroj ? Oni montris al ni, ke sama afero ekzistas en grandaj urboj kiel Novjorko aŭ Londono, sed Marsejlo estas ne tiel granda urbo kaj la Marsejlojanoj ĉagreniĝas, ĉar jam la mohamedanoj okupas tro da lokoj... se oni konsideras, ke ĉiu bona islamano havigas al siaj edzinoj unu infanon jare, kalkulu vi mem. La ciferoj ne estas rasistoj...

LUPO.

---

\* ...Kongreso de SAT-Amikaro.



La Grande Relève des Hommes par la Science

\*\*\*\*\*

Mensuel de réflexion sur l'Economie, 88 Bd. Carnot,  
F 78110 LE VESINET

ofte aperigas tekstojn favore al esperanto (ekz: dupaĝan artikolon de Claude PIRON en n°771 "Kie mitoj ? Kie real-eco?"). Hodiaŭ, en n°789, ĝi publikigas, esperante, jenan:

" VI JA DIRIS "SENLABORECO" ?

Vante pretendi pritrakti la nuran depresion kaj ĝian plej spektindan kaj draman manifestadon, la SENLABORECON, orgojle ignorante la ekonomikiston Jacques DUBOIN (Savoĵ-devena) kiu ne nur jam delonge perfekte diagnozis tiun malbonon kaj antaŭvidis la fazojn de ĝia evoluo sed ankaŭ eltrovis kiamaniere definitive kuraci ĝin, - estas tiel absurde, kiel vanta pretendi kontraŭbatali gravan incendion sen helpo de fajrobrigado. "

(Abono: 11 n-roj, 30 FF ; fremda lando : 35 FF).

\*.\*

En Gotenburgo...

(memorige...)

\*\*\*\*\*

En Gotenburgo, inter kvartaloj, kiujn minacas detruo, kolektiĝas neregule de kelkaj jaroj malfirma internacia amikaro en malgranda eksbierejo "Slintas". Ĉi tie troviĝas libraro plejparte liberecana kaj gazetoj el tutmondo. Filmojn oni montras de tempo al tempo. De la lasta jaro kunvenas grupo por interhelpe lerni Esperanton. Se vi iros Gotenburgen, vizitu nin por amuzi. Kompreneble vi povos tranokti ĉe ni.

Skribu al : SLINTAS, Kaptensgatan 15, S-414 63 GOTENBURGO  
Svedio. Tel: (031) 11 79 08 (Kenet)

"Slintanto".

En Lot-Garonio (Francio) : Aĝenia Esperanto-Rondo kunvenos  
\*\*\*\*\* en Moulin de Carguessac,  
47470 BEAUVILLE, la 9an de aŭgusto (dimanĉe), je la 15a h.  
Perspektivoj por nia grupo. Debato pri aranĝo (eventuala)  
de E-semajnfinoj en nia regiono. Renkontiĝo kun la partoprenantoj de la E-semajno ĉi-jara. AERA-anoj, kiuj intencas partopreni tiun kunvenon bonvolu laŭeble sin anonci skribe aŭ telefone al C.Baudé, 47340 Laroque Timbaut.  
Dankon!

9/21. Aŭg. 81

E-Semajno en "Moulin de Carguessac", BEAUVILLE (Lot-Garonio):

\*\*\*\*\*

La 9an okazos renkontiĝo kun membroj de la departementa rondo. (vidu antaŭe). Vespere, estos starigita neformala programo spegulanta ĉies emojn por la sekvontaj tagoj. Interesatoj sin anoncu laŭeble antaŭ la 14a de julio al C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut. Tel: 95 71 28 (matene).

Sabate 19an kaj dimanĉe 20an de septembro : E-kunveno en "Moulin de Carguessac", renkontiĝo de la geesperantistoj de MONTAUBAN kun anoj de la Girondia grupo. Membroj de AERA estas kore bonvenaj. Pli da informoj aperos en la septembra numero de "Laŭte!".

\*.\*

Girondia grupo

\*\*\*\*\*

\* Sabate 26an de septembro, je la 15a h. kunveno en EYSINES  
(junulardomo aŭ urbodomo)

\* Marde 20an de oktobro, je la 19a, kunveno en CENON  
(Maison pour Tous)

\* Antaŭe, okaze de la Ostro-foiro en GUJAN-MESTRAS estos starigita tie E-budo. Kiuj pretas helpi, sin turnu al P. Sevilla, 108 cours de la Marne, 33470 GUJAN MESTRAS  
Tel: 66 00 70. Dato : ekde la 8a de aŭgusto.

\* Tute simila okazaĵo en LE CANON, je la sama dato. Tie rilati kun Henrieta CHAILLOT, 5 av.de la Réousse, Dune de l'Herbe, 33131 LE CANON.

\*.\*

En FIGEAC (Lot-departemento) estas la kontaktadreso de  
\*\*\*\*\*

L A K R I Z A L I D O

Teatro internacia de Akvitanio

15 rue Clermont, F 46100 FIGEAC, Francio, pĉk:Toulouse 3669 61M

La Krizalido-n kreis Arno Lagrange kaj Solen Gaspard: "Tiu nia projekto naskiĝis sekve de nia antaŭa agado kadre de TESPA (Teatro Esperanto de Parizo). Nia ambicio ludi ofte kaj multfoje la saman spektaklon stumblis pro la nesufiĉa disponebleco de la trupanoj, kiuj jam absorbiĝas per alia profesio.

LA KRIZALIDO proponas la saman spektaklon kaj en franca kaj en esperanta lingvoj.

(Nuna programo : "Ĉu Dio bojas?" de François BOYER, trad. Georgo Lagrange)

Ni ludis "Ĉu dio bojas?" en esperanto en Figeac, antaŭ neniu esperantista spektanto, kvankam ni invitis dudekon da ili en la regiono. Tamen ĉeestis kelkaj homoj, kiuj tiel ekaŭdis esperanton.

Poste ni ludis fine de aprilo en Parizo, Oud Leusen (por la nederlanda kongreso), Lieĝo kaj Lille. Poste en Perpignan en la samaj tagoj kiel la UFE-kongreso sed sendepende en eksterkongresa ejo en ambaŭ lingvoj, en kiuj ni ludas.

Lastvorte, ni informas ĉiujn regionajn samideanojn, ke ni pretas prezenti por ili nian spektaklon, ĉie kie ili deziras. Menciinde estas, ke ni ludas franclingve kaj esperantlingve. Sekve, se vi povas invitigi nin en Kulturdomon por franclingva prezentado, ni pretas fari ankaŭ esperantan prezentadon sen pagigi al vi la vojaĝokostojn.

Interesatoj, kontaktu nin !

- LA KRIZALIDO - "

\* \*  
\* \*

Diskuto pri energio dum esperanto-kongreso

\*\*\*\*\*

De la 24a ĝis la 26a de aprilo okazis en la konferenceto "De Bron" en Oud Leusen la unua Nederlanda E-Kongreso sub aŭspicioj de Federacio de E-organizoj en Nederlando F.E.N. (vidu "Laŭte!" de januaro, rubriko "E-VIVO"). Ĝin partoprenis ĉ. 200 gekongresanoj. La kongresa temo estis "Energio". Parolis pri tiu temo Otto Haszpra el Budapeŝto kaj Roland Levreaud el Bordojo, kiu klarigis pri la franca energipolitiko. Por bone informi la gekongresanojn pri la energiproblemaro F.E.N. eldonis 64-paĝan ilustritan broŝuron (A5-formato), kiun la partoprenintoj trovis en sia kongresdokumentujo. Tiu broŝuro "Energio" estas havebla ankaŭ por nekongresanoj. La prezo estas 6 ned.guldenoj, ekskl. afrankon. Recenzo pri ĝi aperos en venonta "Laŭte!".

-----